

Kio interligas Esperanton kun Teozofio?

Herbert A. Welker

Teozofio estas ampleksega aro da konoj kaj instruoj, kaj Esperanto estas lingvo. Kiel la du aferoj povas havi ion komunan? Evidente ne estas multaj interligaĵoj, sed ekzistas kelkaj, kaj tiuj estas gravegaj.

Ĉar vi legas ĉi tiun esperantan skribaĵon, vi ja scias pri Zamenhof. Sed eble vi ne scias la sekvajn detalojn:

En 1906 li publikigis la broŝuron "Homaranismo". La homaranisma ideo estis antaŭita de "hilelismo". Mi ne pritraktos tion, ĉar oni povas legi artikolojn tre detalitajn en la interreto pri hilelismo kaj homaranismo¹.

Laŭ la Plena Vortaro homaranismo estas "Doktrino postulanta, **ke ĉiu rigardu kaj amu ĉiulandajn homojn kiel siajn fratojn**".

Tiu doktrino entenas 12 "dogmojn". Ili estas legeblaj en la E-Vikipedio. Mi reliefigas nur la unuajn du:

"Mi estas homo, kaj por mi ekzistas nur idealoj pure homaj. Ĉiajn idealojn kaj celadon gente-naciajn mi rigardas nur kiel grupan egoismon kaj hommalamon, kiuj pli aŭ malpli frue devas malaperi kaj kies malaperon mi devas akceladi laŭ mia povo."

"Mi kredas, ke ĉiuj popoloj estas egalaj, kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj, sed ne laŭ lia deveno. [...]"

Kelkaj esperantistoj kritikis Zamenhof, ĉar ili ne volis miksi Esperanton - la lingvon - kun iu filozofio. Fakte la esperantistoj ne bezonas akcepti iun ajn filozofion. Ekzemple la Deklaracio de Bulonjo-ĉe-Marco (1905) tekstas:

"La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu [...] donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si [...]. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas."

Sed Zamenhof emfazis tion en sia parolado dum la Universala Kongreso de 1906:

*"[...] al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo [...] estas **frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj**."*

Cetere li kreis la internacian lingvon pro tio, ke li pensis, ke komuna lingvo estas necesa por malgrandigi la malkomprenon, malamon kaj perforton inter homoj parolantaj malsamajn lingvojn.

Oni povus diri, ke tio estas pasinta historio kaj ke hodiaŭ la E-movado estas malsama.

Tamen ni ne forgesu, ke strofo de la himno de Esperanto tekstas tiel:

¹ <http://www2.math.uu.se/~kiselman/bjalistokoueak.pdf>
http://www.plansprachen.ch/files/HOMARANISMO_PRELEGO2005-6.pdf

*Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.*

Krome en la 99-a Universala Kongreso en Bonaero (2014) estis akceptita rezolucio, kiu interalie asertas:

*“Ni [...] deklaras ke la valoroj necesaj al la konstruado de daŭripova monda socio estas kernaj valoroj de nia movado, ĉar mondo, en kiu Esperanto daŭre havos sencon, estas mondo, kiu ekonomie, politike kaj kulture, konservas diversecon, **pacon kaj justecon.**”*

Do la plejmulto de esperantistoj - pro la internaj ideoj de Esperanto - celas **pacon, fratecon, justecon.**

Kio pri Teozofio?

La **unua** celo de la Teozofia Societo de Adyar estas:

Formi kernon de **universala frateco** de la homaro [...].

Tio signifas, ke la universala frateco estas almenaŭ tiel grava por la teozofiistoj kiel por la esperantistoj.

Cetere unu el la celoj de la Universala Esperanto-Asocio estas:

plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo.

Tio implicas, ke ne devas esti distingo de nacieco, raso ktp., kio konformas al la lasta parto de la citita unua celo de la Teozofia Societo de Adyar, kiu tekstas: **“sen distingo de raso, kredo, sekso, kasto aŭ koloro”**.

Pro tiu unua celo evidente en multaj teozofiaj tekstoj oni emfazas la universalan fratecon kaj instigas la teozofiistojn esti fratecaj. Aliaj sintenoj ofte rekomendataj estas **pacemo** (kiu estus konsekvenco de frateco), **toleremo** (kiu sekvas el la nedistingo de raso, kredo ktp.) kaj **amo por ĉiuj homoj** (kiu memorigas nin pri la Zamenhofa batalo kontraŭ la malamo inter la popoloj).